Karaj,

ILEI devis kun bedaŭro sed komprenemo akcepti la deziron de nia tre longtempa redaktoro de *Juna amiko*, Geza Kurucz retiri sin el tiu posteno fine de 2011. Geza estis ne nur la fonda redaktoro de la revuo antaŭ 38 jaroj, sed ankaŭ la motoro en la ideo lanĉi tian revuon ene de la tiutempa Hungara Esperanto-Asocio, por plenumi evidentan bezonon por la multaj tiamaj lernantoj de Esperanto. Li kun kelkaj aliaj instruistoj povis vidi la similspecajn revuojn je dispono por la lernantoj de aliaj lingvoj, kaj komprenis la valoron aperigi ion similan en Esperanto. Feliĉe, li konvinkis ILEI- kaj HEA-estraranojn pri tio, kaj la revuo ekaperis. Li redaktis la revuon regule de 1973 ĝis 1981, kiam li transdonis ĝin al Oldrich Knichal, slovako vivanta en Hungario. Li redaktis ĝin ĝis 1986, kiam li transdonis la safeton al alia eksterlandano vivanta en Hungario, novzelandano Stefan MacGill. Kiam en 1996, tiu sentis kreskon de aliaj ILEI-taskoj, la revuo denove bezonis redaktoron. Geza precize en tiu jaro emeritiĝis el lernejestra posteno, do venis la aŭdaca ideo peti lin repreni la torĉon. Feliĉe, li tion akceptis, kaj ekde tiu momento li denove sola ĉefredaktis la periodaĵon ĝis 2004 kaj de 2005 la duonon de la revuo, kiu tiam ricevis duoblan amplekson (52 p.).







En 2006 Geza estis elektita honora membro de ILEI. Nun 75-jara, li deziras liberigi sin de tiu peza devo trifoje jare lukti kontraŭ obstinaj limdatoj. *Juna amiko* multe suferos pro tio – Geza el ĉiu en la redakcio estis ĉiam tiu, kiu orde kaj frue pretigis sian materialon, rigore respektante limdatojn. Ni ĝojas, ke Geza pretas plue kaj laŭokaze kontribui kaj helpi, ankaŭ en la enkondukado de novaj redaktoroj. Per aparta mesaĝo, ni alvokos por novuloj eniri la redakcian teamon, aŭ prizorgi difinitajn rubrikojn.

Geza anoncis sian deziron al ILEI kaj siaj redakciaj kolegoj jam komence de la jaro, donante al la ligo tempon prepari sin por nova epoko.

La tuta estraro de ILEI, kaj la redakcio kaj teamo de *Juna amiko* kore dankas al Geza pro la multjara fidela servado!

--
Stefan MacGill
Prezidanto, ILEI